etc. al sindicato.

nifestación comenzará a las

**ción hacia la cárcel.**

# Esperanto

## Esperanto kaj la liberecanaj homoj

Mi estas CNT-ano antau dudek jaroj kaj mi audis paroli pri esperanto ankau antau multaj jaroj, sed mi ne estas interesata pri gi tiel, kiel la plej parto de la nunaj liberecanaj homoj. Mi memoras filmo kie katalunaj laboristoj estis lerninte esperanton dum la dudekaj jaroj. Mi pensis ciam, ke la internacia lingvo estas afero preterpasita al historio.

Antau unu jaro mi konis kolegon -mi estas instruisto- kiu ekparolis pri esp-o kaj ekinstruis gin al mi. Mi organizis en mia lernejo esperantistan grupon kun ok lernantinoj, kiu ne ekzistas plu. Sed mi esperantistigis kaj mi lernis sufice por iri auguste al la Kongreso de UEA en Francio. Mi vidis trimil da esperantistoj parolante e-on kaj mi esperantistigis plu, car mi vidis, ke ne nur liberecana homo estas interesata pri esp-o.

Antau ci-tio mi ne konis neniun CNT-anon au liberecanon parolante esp-on. Poste mi konis iujn esperantistajn samideanojn kaj mi guis multe. Antaune mi ne legis la esp-an kurson -la unua fojo- en nia jurnalo. Sed nun mi ciam legas la esp-ajn artikolojn unue.

Mi opinas, ke multaj kunuloj kaj samideanoj pensas, ke ni etas frenezaj kaj neniam esp-o estos uzata en niaj kunvenoj kaj neniel nenie. Ni devos iri malrapide, sed klopodante instrui la lingvon al niaj amikoj kaj kunuloj. Ni devus uzi gin ciel tiel ni povos, precipe kun eksterlandanoj. Ni devos studi la manieron skribi la malfacilaj literojn, ktp.

Mi estas komencanto, do, karaj esperantistaj samideanoj, bonvolu pardoni min pri miaj eraroj

**Kani**
**Don Benito**